

BEOGRADA VERDA SITLO

Jaro III

Beogrado, septembro-decembro 2008

n-ro 3(7)

MILORAD PAVIĆ – VERKISTO DE LA XXI JARCENTO



Mondfama serba viva poeto kaj proza verkisto, historiisto de la serba literaturo de la XVII-XIX jarcentoj, tradukisto de Puŝkin kaj Bajron, profesoro de universitatoj (Parizo, Vieno, Beogrado, Novi Sad), konstanta membro de la Serba Akademio de Sciencoj kaj Artoj, kaj membro de Eŭropa kultura societo – M. Pavić fariĝis konata literaturisto jam komence de okdekaj jaroj de la XX jarcento. Liaj spece heterogenaj kaj tematike diversaj verkoj estas tradukitaj en multajn lingvojn en multaj landoj, eĉ en Ĉinio.

Pavić jam publikigis kvin librojn, kiam lia *Hazara vortaro* ekis triumfan vojaĝon tra la mondo. De la momento, kiam aperis la unuaj tradukoj de la *Vortaro* kaj post kompleta konatigo de legantoj kun tiu ĉi verko en mondaj proporcioj kaj samtempe kun la publikigo de lia dua majstroverko *Pejzaĝo pentrita per teo*, oni povas paroli pri „la fenomeno Pavić“.

Literaturo estas opesio de Pavić. Scivolema verkisto troviĝis sur la vojo de bizanca romano kiu ankaŭ estis inspiro de frua eŭropa romano. En lia „romano-leksikono“ interplektiĝas miniaturaj rakontoj komponitaj de ideoj el kristanaj, islamaj kaj hebreaj fontoj. Pro tio kritikistoj envicigas Pavić-on en la unuajn kreintojn de moderna serba fantastiko.

Dro Miodrag Stojanović

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumento
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)
Aperas trifoje jare

Ĉefredaktoro: d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro
Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana
Šundeka, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić,
Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden
Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

Originala prozo

Dimitrije– Diso Janičić

ESPERANTISTOJ

Ni poŝtistoj – trolonge rakontis Novica – krom ĉiutaga laboro, dum kiu, kompreneble, estas vizitoj en koncerna urboparto kie ni post certa tempo ekkonas ĉiujn loĝantojn, ni havas ankaŭ niajn 'specifajn klientojn'. Plejparte ili estas 'ŝatokupantoj', kiel oni diras, homoj havantaj siajn ŝatokupojn, interesiĝon dum libera tempo. Tiel mi ekkonis iun kiu tutan muron de sia ĉambro kovris per skatoloj de alumetoj, kiujn al li sendis homoj el diversaj landoj. Al mi tio estis tre interesa, ĉar de kiam ekzistas ĉi tiuj gasaj bruligiloj, ĉe ni preskaŭ oni ne povas aĉeti ordinarajn bruligilojn. Al iu pli aĝa sinjorino ĉiutage atingadis ilustritaj kartoj el diversaj mondpartoj, ŝi kolektadas ilin, sortimentas, kaj kiam mi hazarde ekdemandis ŝin pri iu lando el kiu ŝi ricevis la karton, ŝi elportis blokon en kie estis poŝtkartoj ĵus el tiu lando, rakontis al mi multajn detalajojn, montris kiel aspektas surbilde diversaj regionoj de tiu lando. Alie, tiuj homoj rakontas al ni poŝtistoj pri siaj ŝatokupoj, persvadante nin al ili kuniĝi.

Tiel mi ekkonis iun esperantiston. Mi ne sciis kio estas tio, kaj li tion klarigis al mi. Krom tio li diris, ke nia la plej multekosta poŝtmarko estas ĵus marko presita en eksa Jugoslavio okaze de iu ilia kongreso, okazinta antaŭ kvardeko kaj iom da jaroj en Beogrado. Li estas ordinara homo, nur li ricevas multajn poŝtaĵojn: diversajn gazetojn kaj leterojn sur kiuj estas ofte presita la verda kvinpinta stelo. Li klarigis al mi, ke la verda koloro reprezentas liberon, la kvin pintoj estas kvin kontinentoj, kaj la litero E en la stelo estas signo de ilia lingvo. Li diris ke en multaj lingvoj la vorto „nada“ elparolas kiel „espero“, kaj el tiu vorto iu pola kuracisto, Zamenhof, ŝajnas ke li nomiĝis, faris nomon de la lingvo kiun li elpensis, kaj per kiu hodiaŭ parolas kelkaj dekoj da milionoj da homoj en la mondo.

Ĝi estas tre simpla lingvo, li diras, ĝin oni povas ellerni dum kelkaj monatoj. La literoj estas ordinaraĵoj, kiel niaj latinaj, kaj oni legas kiel estas skribitaj, samkiel nia Vuk faris. Al mi estis nekutime kiam li diris ke ni jam scias parton de tiu lingvo, ĉar ĉiuj vortoj devenintaj internaciaj, kiel telefono, apoteko, advokato, aŭtomato kaj similaj – aŭtomate eniras tiun lingvon. Mi ne kredus, se mi ne estus renkontinta lin parolanta kun iu Ĉino. Mi demandis lin ĉu li konas la ĉinan lingvon, kaj li diris al mi, ke li ne konas, sed lia amiko Li Sen el Ĉinio, kun kiu li korespondas jarojn, trapasadis Beogradon, kaj venis por persone interkonatiĝi. Tiam mi invitis ilin trinki „bieron“, do tiel „pivo“ oni diras en Esperanto, kaj ni interŝanĝis salutdezirojn. „Vivu“ (ĝiveo) ili diris al mi, kaj ankaŭ mi al ili.

Verdire, tio ekplaĉis al mi. Eble, kiam mi pensiiĝos, ankaŭ mi ellernos tiun lingvon.

*Ĉi tiu teksto estis publikigita en gazeto PTT Glasnik
(PTT Heroldo) en marta numero de la jaro 2001
Esperantigis P. Marinkoviĉ kaj publikigis en sia reta gazeto
„Primara“*



Originala poezio

Dimitrije Janičić

DEMANDOJ

Tra kribilo de sperto
mi semas demandojn sen respondoj.

Kial gardis la tempo
prahistorian memoron de Altamiro?
Ĉu amo kaj malamo estas fratinoj?
Kiajn sekretojn interŝanĝas
lupoj en vintra nokto?

Ĉu astroj okulsignadas al ni
el universaj senlimoj?
Ĉu oni povas depreni zorgojn
kiel malpuran ĉemizon?

Kial estas lulilo kaj tombo
tiel proksime?

Ĉu ni estas nur farunoj
de eterna muelisto?

Eĉ ne unu respondo pasas
mian barikadon de suspekto.


Tradukoј

Десанка Максимовић

ЗА ЧОВЕКА КОЈИ ЈЕ ПОГУБИО ПЕРГАМЕНТЕ

Тражим помиловање
за човека
који се вратио с дуга пута
а погубио доказе и пергаменте
да је онај за кога се каже
и који јесте,
те му људи не верују на гола слова.
За човека који руком показује
охлађени димњак свога крова
и травом зараслу стазу до прага,
а нико му неће да посведочи
да је проводио тамо дане.
За човека кога жива сахране
па није ни на земљи
ни у њеној тами
и мемли.
За витеза
коме су руку љубиле мајке
и кога су благосиљали старци
докле не посече троглаву неман
граду испред самих довратака,
док не потуче по стењу шарке
и не повади змијске жалце
из ногу босе чобанчади,
а кога забораве за трен ока,
још док гледају мртву аждају
и мртву шарку и поскока.
За човека на кога се

забравом и они баце
које из чељусти немани спасе.
За војника који буквице нема
а без књиге царске важне
не може цару да докаже
да је у рату задобио
седам рана без пребола,
да има на прсима ожиљака
више него у грудобрана,
да му још телом метак кола.
За војника кога кад борба прође
баце као сломљену пушку
у старо гвожђе.



POR HOMO KIU PERDIS SIAJN PERGAMENOJN

Amnestion mi petas
por la homo kiu de longa vojaĝo revenis
kaj perdis la pruvojn kaj pergamenojn
ke li estas tiu kiu diritas
kaj kiu li estas,
do, homoj ne kredas la nurajn vortojn.

Por la homo kiu permane montradas
la fridiĝintan fumtubon sur tegmento sia
kaj herbokovritan vojeton ĝissojle,
ho ve, neniu atestemas
ke li tie vere longe restadis.

Por la homo kiu viva entombigitis
kaj estas plu nek sur tero
nek en ĝia mallumo
kaj ŝimo.

Por la heroo
kiun malkisadis patrinoj
kaj benadis maljunuloj
kiam li buĉis la trikapan monstron
ĝuste antaŭ la urba pordego,
kiam li mortfrapis surroke vipurojn
kaj forprenadis serpentajn pikilojn
el piedoj de povraj etpaŝtistoj,
kaj kiujn oni momente forgesis
vidante ankoraŭ mortan drakon
kaj mortan vipuron aŭ aspidon.

Por la homo kiun per forgeso kovras
eĉ tiuj kiujn li el makzelo
de monstrego savis.

Por soldato libreton ne havanta
sed kiu sen grava cara libro

ne povas al caro pruvi
ke lin trafis dum milito
por eterne eĉ sep vundoj,
ke surbruste ja videblas
cikatroj pli ol sur la remparoj,
ke kartoĉo enas liakorpe.
Por soldato kiu post milito
forĵetitis kiel oldpafilo
en rompitan ferrubaĵon.

Tradukis: Agnesa Eremija



Jovan Grčić Milenko (1846-1875)

KAJ ŜIA FILO ESTAS LERNBUBO

Tursonoriloj batas,
kaj la lerneja bruas.
Ĉe mi panjo sidstatas,
kaj ŝiaj larmoj fluas.

"Bona panjo, kial ploro?"

karese mi emfazis.

"Karul', veas mia koro,
lernbubo iu forpasis."

Tradukis: Boriša Milićević

Simo Matavulj (1852-1908)

**BAKONJA FRAT'-BRNE
(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(sepa parto)

Sed kiam la rivero pligrandiĝas, kaj la alveno de transriveruloj malestas, li tiam laboris sen spico. Boban metadis nasojn ĉiuvespere, pro kio li allogadis paŝtistojn eltiradi ilin antaŭtagiĝe, dum nun tion Kruĝegulo faradis; se li eltiradis iun barbfiŝeton, ricevadis li unu aŭ du, sed trutojn neniam gustumis. Dume, Boban akiradis por fiŝoj bonan monon de la monakoj! Kiam Kruĝegulon bezonis nek la muelisto nek la forĝisto, tiam lin vere bezonis la veturigistoj, por ke li trenadu la bestfloson, en kiu ili sidadis ridante kaj fumante. Poste lin bezonis ĉiumomente Ekskrementulo kaj lernantoj, kaj vespere la bovisto. Estas mirinde ke, kiom ajn ĉiuj tedis lin kaj kriadis, li neniam kuntiriĝis, nek diris: "Mi ne volas! mi ne povas!" Male, li estis kontenta; kaj en tiuj malmultaj momentoj, kiam oni lasis lin respiri, li "sorbis" el sia pipo.

"Kie vi estas, Kruĝegulo!" - "Mi? Ĉu ne? Jen mi! Lasu min, je via fido, elsorbi duonon de pipo!" – respondadis li kutime.

Unuvespere eklumis la luno tra la la milda vetero, oni dirus ke tio estas printempa nokto! La ekleziuloj iom sidis en la malnova kuirejo, poste disiris. Virkato, Bujas kaj Virvulpo interigis Korpulentulon kaj, senĉese irante post la monakojn, flustris ion al li. Li kvazaŭ hezitus, kvazaŭ li volus, aŭ ne volus konsenti pri tio. Fine Virvulpo sulkigis la buŝon je li, kvazaŭ malŝate, je kio Korpulentulo etendis al li la manon, kaj manpremis ankaŭ al Virkato kaj al Bujas, poste li antaŭiris la onklon kaj malfermis al li la ĉelon.

-Tii-el! Hu! La fajreto min varmigis kaj mi tuj endormiĝos. Bonan nokton! Bonan nokton al ĉiuj! diris frat'-Brne.

-Bonan nokton! Bonan nokton! mansalutis reciproke ĉiuj.

Ok pordoj fermiĝis, poste la rigliloj ektintis, kaj ekestis silento.

Kiam la luno altleviĝis, Virvulpo duone malfermis la pordon de sia ĉelo, kaj fingropinte eliris en la vestiblon, tenante la ŝuojn enmane. Poste

kaŝeliris Virkato, ankaŭ li piednuda, kaj mansvingis al Virvulpo, ekironte al li. Apenaŭ tiu duopo kunvenis, eliris Bujas.

Bestaĉo! Hirtulo de Hirtuloj! Se li ne eliros, mi timas ke li denuncos nin! – flustris Virvulpo.

Pri tio li ne kapablas! Pri tio li ne kapablas!... diris Virkato.

Atendu ni lin ankoraŭ iom.

-Iru ni antaŭ la ĉambron de Trogulo kaj mi eĉ ektusos se estos necese! – diris Bujas.

Kaj ĉiuj tri, tenante la ŝuojn enmane, ĉirkaŭiris la vestiblon.

Ili atendis konsiderinde, sed post kelka tempo ekgrincis la riglilo, la pordo malrapide malfermiĝis kaj Korpulentulo aperis.

-Ne timu!...Eliru!...Vi ja scias ke Brnen eĉ kanonoj ne povas vekidum la unua sonĝo! – kuraĝigas lin la kamaradoj.

-Ve al mi! – flustris Korpulentulo, sed li ekiris post ilin laŭŝtupare en la korton.

Bujas kaj Virkato forkuris antaŭ la kelon, kie estis ligna ŝtupareto, kiu ili kunportis kaj rektapogis al la tombejmuro kiu per sia kvinmetra longeco ligas la preĝejon kun la kuirejo. Virvulpo volis supreniri la unua, sed Bujas haltigis lin.

-Nu kie estas tio? ... Vi scias? kaj li klinigis la manon al la buŝo por rememorigi lin pri la trinkaĵo.

Je tioVirvulpo sola fortrotis al la kelo, dum Bujas suprenkuris laŭŝtupare kvazaŭ sciuro, poste ekrajdis la muron, kaj komencis piedvesti sin. Post lin suprenkuris Virkato, poste Korpulentulo, kaj ĉiuj tri, rajdante surmure atendis Virvulpon, kiu malpli facile grimpis, ĉar li portis ion surŝultren pendigitan. Jen ili eltiris la ŝtupareton, poste transigis ĝin je la alia flanko kaj apogis ĝin al la tombo de frat'-Felician Felicianoviĉ. La lernantoj haltis, rigardante kelkajn blankajn tombojn heligitajn per lumo, poste ili kunigis la rigardojn al la plej nova tombo, kiu finis la trian vicon.

-Kompatinda mia, bona Inoĉenco! – diris Virvulpo kruccsigninte.

Dio donu al vi pacon, ankaŭ vi plurfoje ĉi tien malsupreniradis!... Eldiru ni almenaŭ "Saluton al Maria" je lia paco!

La kamaradoj, frustrante la preĝon, atingis lin kaj metis la ŝtupareton super Felicianon, poste eliris el la tombejo.

-Nun ni unue respiru! – diris Virvulpo kiam ili estis sur la ebena kontraŭ la nova porjunula kuirejo! Kaj vi, Korpulentulo, silenton. Ni jen tiel ĉi faradis antaŭ Kaŭrul-morto, kiam ajn la rivero elkreskadis, kaj en la

muelejo ne troviĝadis la transriveruloj... Kiam ni tion unue... mi scias ke tio okazis dum tiu vintro kiam Stefano venis...

-Diligenta nia Stefano! diris Bujas kaj suspiris... –Tiu Koleremulo! Tiu Koleremulo!...

-Lasu nun lamentadon! – daŭrigis Virvulpo.

-Do, ĉu vi komprenas, Korpulentulo, - jen estas la kvina jaro de kiam ni iradas tien al vesperkunveno! (montrante al li permane novan porjunulan kuirejon, de kie oni aŭdis grandan tumulton). Neniu el la monakoj tion konjektas, kaj la servistoj ne kuraĝas nin denunci, ĉar ne estas al ili utile. Do, silenton!... Mi ne diras ke vi povus perfidi nin, sed mi kvazaŭ timas ke Koleremulo iel ekflaru kaj vin eltentu. Vi scias kia li estas.

-Nu, lasu la predikadon! interrompis Virkato kaj ekiris al la porjunula kuirejo. Kial vi lin instrukciu, kiam li mem konscias ke Trogulo forpelus lin se eksciinte tion!

Bujas frapis perkalkane la pordon, kiu malfermiĝis. Pro la forta lumo, la okuloj de la lernantoj ekbrilegis.

-Estu bonvenaj! – oni krias de interne. Eniru! Sidiĝu!

-Ĝuste vi estas bonvenaj, post tiom da tempo kaj eĉ kun la regalaĵo!- diris Boban, kiu elsaltis renkonten kaj deprenis la ĉapon.

Ĉu mi diris ke li venos kun la regalaĵo, he? Ĉu vi vidas!? Ankaŭ Jerkoviĉ, falko de falkoj! Unuafoje ĉe ni al vesperkunveno, he, Jerkoviĉ? Nu ĝuste bele, nu ĝuste bele! Estu bonvenaj! Sidiĝu!...La kvaropo eksidis sur la ŝtonmuraĵon, inter Trtak kaj Boban. Strabulo, Dundak, Beljan, la bovisto, sidiĝis unu apud la alia, ĉiuj sur la ŝtonmuraĵon, kaj pro la granda varmeco ili ŝirmis vizaĝojn per la manoj.

-Nu kiel, viroj? Kiel oni vivas, he? – demandis Virvulpo.

-Je mia fido, ne estas malbone, kaj jen, se Dio subtenos, kun vi bone! – respondis Strabulo okulsignante al la apuda kamarado.

-Ĝuste bone, kaj bele kaj fratece, kaj kiel indas! – komencis dolĉumi Trtak. Ni ĉiuj estas servantoj de la sankta Frane. Jen, ni diru, ni ne ĉiuj estas egalaj, ĉar ankaŭ la fingroj surmane ne estas egalaj; iu estas mesisto, iu diakono, iu servisto, sed tamen ĉiuj ni bezonas unu la alian. Ĉu tiel estas, fraĉjoj?

-Tiel estas, tiel! – ekkriis ĉiuj.

-Do, en nomo de tio estu sanaj! daŭrigis Trtak. Je la sano de tiuj ĉi diligentaj diakonoj kaj de ilia bela junaĝo. Donu Dio ke ili ĝisvivu tion kion ili sopiras!

La servistoj ekstaris kaj deprenis la ĉapojn.

-Kaj ĉi-okaze oni devas rememori pri ankoraŭ du iliaj kamaradoj, el kiuj unu estas vivanta, kaj la alia estas en la dia kortego! Do, por la animo kaj por la eterna paco de la mortinta Lovriĉ!

-Amen! –krikantis ĉiuj.

-Kaj por la sano de Ĉimavica, kie ajn li estu!

-Vivu li!

Kaj ĉiuj trinkis laŭvice.

-Vere, nia Kaŭrulo eĉ morta utilas! diris la bovisto al Virvulpo. Pripensu, diakono, de kiam Dio lin forprenis, kaj, jen, disaŭdiĝis ke li reaperadas kaj la diablaj transriveruloj ne kuraĝas tien ĉi ŝtelveni! Ĉiuj ni povas senzorge dormi.

-Kiel tiu kiun Dio benis kaj vivan kaj mortan! aldonis Dundak.

Nun oni komencis interparoladon pri ĉio, kaj plejparte pri la pasintaj vesperkunvenoj. Ĉiuj volonte rememoris Stefanon kaj liajn ŝercojn.

-Nu kie estas Kruĉegulo? demandis Bujas. Mi vane lin okulserĉas.

-Jen li en la postforna angulo. Li endormiĝis jam antaŭ du horoj.

Nu, interrompu la interparolon, kaj vi aŭdos kiel li ronkas! diris Strabulo.

Ili eksilentis. Vere, Kruĉegulo ronkis tiom kiom duopo kune ne estus povinta.

-Voku lin! diris Virvulpo.

La bovisto ekpuŝis lin perpiede.

-Leviĝu!

-Ĉu mi? demandis Kruĉegulo.

-Vi, azenaĉo, ja kiu alia estas en via haŭto? La diakonoj vokas vin.

Grgo alproksimiĝis al la fajrejo, kun la malorda hararo kaj deprenita zono.

La lernantojn kaptis ridado.

-Donu al li tuj tosti! ordonis Virvulpo.

Kruĉegulo eldiris ion konfuzan, kaj klinis la ledvinujon.

-Trinku, trinku, kiom ajn vi povas! kriis al li Virvulpo..

Post dudek englutoj, Kruĉegulo respiris, okulrulante.

-Ankoraŭ! Ankoraŭ! kriis la lernantoj, kvankam tio ne estis laŭ volo de la aliaj.

Grgo denove klinis: glut', glut', ĝis li ŝveliĝis kvazaŭ vampiro, kaj poste eksidis tutmezen de la planko kaj komencis pleniĝi pipon.

Nun ĉiuj ĉirkaŭis lin, incitetante lin centmaniere. Kaj li, babilis ion, babilis, ĝis lia lango komencis penmoviĝi.

Post kelka tempo diris Boban al li:

-Nu, Grgo, vizitu la tegmentaĵon kaj stalon, ĉar estas necese ke iu tion faru, kaj vi estas la plej juna laŭofice! Iru!

-Ĉu mi, ĉu ne? karesdiris Kruĉegulo. Mi ĉiel obeos vin; ĝuste ĉiel, ĉiel dum-ta-ge, sed nun, je ĉi-horo, mi, ne!...

-Kaj kial ne nun?

-Tute ne! Por ke min Kaŭ-ru-lo ti-r.-r. Poste li glitiris denove al la postforna angulo, kie li ree ekronkis.

-Li estas timema kiel kapro! diris Boban ridante.

-Ni ja faros al li ŝercon ununokte! diris Bujas.

La lernantoj longe sidadis, kaj poste sammaniere revenis en la monakejon.

La morgaŭan tagon ekmiris frat'-Brne ke lia nevo ne alportis pli frue akvon kaj brulaĵaron en la metala brulujo; li vokis lin du-trifoje, poste foriris en la antaŭan ĉelon, kaj tie, Korpulentulo estis dolĉe dormanta.

-Ti-el!! diris Brne kaj rapide kaptis de sur la bretaro tiun vergeton, per kiu lia nevo kutime gratadis lin surdorse, kaj ekskurĝis lin per ĝi.

-Ti-el, azeno de azenoj! Vi jam komencis sinjorumi, he!? Mi vin veku, ĉu?...

Kiom ajn tiu batkuko estis malŝata al Korpulentulo, tamen lia unua penso estis: "feliĉe al mi, ĉar la onklo ne scias!" – kaj foriris por alporti akvon. Sed, ĉar li rapide enordigis la ĉambrojn kaj ekiris al la

matenpreĝo, lin kaptis la suspekto ke iu el monakoj eksciis, aŭ Ekskrementulo kiu iris renkonten al li.

-Nu kion vi ĉi-nokte faris, he? demandis lin la kuiristo de neproksime.

La spiro de Korpulentulo interrompiĝis kaj liaj piedoj komencis ŝanceliĝi.

-Mi demandas vin: ĉu vi ne dormis ĉi-nokte, se vi ne povis pli frue ellitiĝi, kaj mi devis sonorigi!

-Do...loris min la ventro! retrovis sin Korpulentulo.

-Ho, la ventro vin doloris! diris pli milde Ekskrementulo. Nu, mia fileto, kial vi manĝas tiom multe? Kial vi manĝis tiom da fiŝoj hieraŭ vespere? Iru rapide ordigi kio estas enda, diris li, doninte al li la pregeĵsilon.

Korpulentulo iom rekonsciiĝis, sed la kano en lia mano tremis kiam li bruligadis kandelojn. Vagirante tra la preĝejo, li preĝis:

-Mia bela sankta Frane! Liberigu min ĉi-foje, kaj mi jen ĵu... (li diri: "ĵuras", sed ŝanĝis opinion) jen mi donas al vi parolon ke mi ne plu faros!

La monakoj eniris. Estis vico de Koleremulo por diservi. Kiam li turnadis la dorson al ili, kaj la vizagon al la altaro, tiam Korpulentulo rigardis siajn kamaradojn, kiuj babilegis preĝojn, kiel kutime oscedante; sed kiam Koleremulo turniĝadis al ili por beni ilin, tiam Korpulentulo mallevadis la kapon, ĉar li timis la severan rigardon de Koleremulo, kiu povus penetri ĝis la fundo de Korpulentul-animo, kaj ekvidi la grandan sekreton – se li jam pri ĝi ne sciis.

Postkiam la sacerdotoj eliris, li malrapide postiris ilin, streĉante la orelojn por kapti kion ili parolas. Kaj trairante la manĝejon, li apudiris la muron, preta eskapi, se Koleremulo subitiĝos al li: "Nu kie vi estis ĉi-nokte, he, juna Jerkoviĉ, he?" Ĉar senĉese ŝajnis al li ke – tuj kiam tiu malfermus buŝon, li aŭdos tiun fatalan demandon. Sed Koleremulo eksidis por trinki kafon ne atentante iun ajn. Tiam Korpulentulo rekspiris kaj komencis flati Ekskrementulon, pli multe ol kutime, rakontante al li ion ajn kaj ridante. La kamaradoj, postebriecaj, ekrigardis mire, kaj foriris. Poste li ekpetis Grgo-n por pardonigi lin ĉe la onklo. Post tio Korpulentulo prezentigis al frat'-Onklino, demandante ĉu li bezonas ion. Poste li kuraĝiĝis eĉ por oferti sian servon ankaŭ al Koleremulo.

Ĝuste mi bezonas malgrandan tenajlon. Alportu ĝin el la forĝejo! diris Koleremulo. Korpulentulo turniris en la novan porjunulan kuirejon, kie li trovis Kruĉegulon solan. Al Korpulentulo ŝajnis ke, kiom subite li transiris la sojlon, Kruĉegulo ekhavis tute alian mienon ol kutime. Sed tio nur momente ekŝajnis al li, ĉar je lia demando kial tiu soleciĝis, li komencis per sia ĉiama: "Ĉu mi, ĉu ne? rigardante stulte. De tie Korpulentulo foriris al la forĝisto kaj prenis la tenajlon.

-Hodiaŭ via nevo estas tre diligenta, diris Koleremulo dum la tagmanĝo.

-Pro tio ke li ricevis ĉi-matene pun-kaĉon, respondis Trogulo, rakontante kio okazis, kaj aldononte mallaŭte:

-Kaj nun mi bedaŭras, ĉar mi poste eksciis de la kuiristo ke lin doloris la ventraĵo!

Tion aŭdis Virkato kaj elrakontis al la kompanio, kaj tial Korpulentulo ekploris. Vane la kamaradoj lin konsolis, vane ankaŭ Ekskrementulo lin karesis, li senĉese verŝadis larmojn. Poste en la lernejo li iom trankviliĝis, sed kiam oni komencis paroli ke ĉi-vespere oni vesperkunvenos, li ekardis:

-Dio mian kruron rompu, se mi tien pluvenus! Vi estas kulpa, vi allogis min! komencis li riproĉadi Virvulpon.

-Nu bone, ne necesas ke vi ĵuru, nek kapricu! Neniu petas vin, neniu pelas vin – respondis trankvile Virvulpo. Dum tiom da jaroj ni iradis sen vi, kaj ne rememoradis ke iu al ni mankis. Vi ja diras ke mi kulpas! Prave vi diras! Mi kulpas, jam sufiĉe, ke mi konsideris vin kamarado!...

-Ni ne volu tiel! enmiksiĝis Bujas, sed ni estos veraj kamaradoj. Ke al vi estas penige, mi komprenas, ĉar ankaŭ al mi estis penige en la komenco. Vi opinias ke estas granda peko iomete festeni dum ĉi-tempo, je karnavalo, kaj en nia aĝo. Mi ne diras ke tio tute ne estas peko; sed ĝi estas tre malgranda, ĝuste peketo, kiu estas pardonebla. Tiujn aferojn mi scias pli bone ol vi, same kiel pli bone ol mi sciis Kaŭrulo kaj Ĉimavica.

-Ne estas tio, sed li estas timema! diris Virkato.

-Vi mensogas! ekkriis Korpulentulo. Mi ne estas timema! Mi ne devenas de kie vi, kie homoj timsumilas kaprojn!... Jes, tutsimilas kaprojn, ĉar nia unuopulo pelus viajn kvindek...

Nur iomo mankis por interbatiĝo. Bujas klarigis al li:

-Li ja ne diras, Ive, ke vi estas timema pro la timo, sed, vi scias, pro la onklo, por ke li ne eksci, kaj elpelu vin. Kaj jen mi ĵuras al vi ke, se tio okazos, endus ke oni nin ĉiujn kvar forpelu, ĉar ni ĉuj tri surgenuiĝus kaj dirus: "Ne faru tion, ĉar kiom multe li kulpas, dekoble pli ni mem kulpas". Do, rekonsciigu, fraĉjo, kaj ni iru ĉi-vespere!

-Mi ne volas! Tute ne!

Li hezitis du tagojn, kaj ili ne volis iri sen li. Tio kortuŝis lin, sekve la trian tagon li konsentis, kaj ĉiuj kvar, samvoje kaj sammaniere, foriris al la vesperkunveno.

Ĉar la rivero estis senchese akvokreska, la vesperkunveno okazadis

kelkajn noktojn sinsekve. Korpulentulo al kutimiĝis, kaj povis ankaŭ ellitiĝadi pli frue. Kiom komence hezitante, tiom li nun instigadis al foriroj.

Tiel daŭris ĝis la tria tago de la karnavalo, kiu estis tiujare en la mezo de marto. Tiun tagon vespere kunvenis ankaŭ la servistoj en la malnova porjunula kuirejo, en la monakejo, kaj estis permesate ke ankaŭ la lernantoj festenu.

Post instruoroj, antaŭ tagmezo, Strabulo, kun la fulgumita nazo, ĝisatendis monakojn antaŭ la preĝejo.

-Tiu ĉi frue komencis! diris frat'-Onklino.

-Mi venis sciigi vin, frat'-Brne ke oni devas jam hodiaŭ hufoferi la flavĉevalon, ĉar ĝi restis sen feroj je ambaŭ antaŭaj hufoj.

-Tii-el! Nu iru tuj! Oni preparu ĉion necesan, kaj jen mi post vin.

-Iru ankaŭ ni, ĉar estas tiel bela vetero! diris la monakejestro, kaj poste ili ĉiuj foriris promeni, kun la lernantoj malantaŭe.

Tie ariĝis la servistoj, ĉiuj iomete fulgumitaj, kaj Kruĉegulo tute nigra, kiel arabo; ĉirkaŭ lia kolo oni pendigis bulbo-girlandon, dum en lian zonon oni enigis fajrohokon.

-Ne estas parolende pri hufoferado! diris Trogulo. Eĉ diablo terurigas, kaj des pli la timema ĉevalo!

-Ĝuste ĝi estas al kutimigenda! diris Koleremulo. Elirigu vi ĝin! Kruĉegulo elkondukis la flavĉevalon, kiu maleme rigardis la akompananton. Korpulentulo ekkaresis ĝin. Strabulo donis al ĝi avenon en kribrilo. Tri-kvar servistoj ĉirkaŭis ĝin, streĉinte la ŝnuron, per kiu ili premligis ĝiajn piedojn por renversi ĝin – ĉar ĝi estis obstina, kaj ne elzistis alia maniero por hufoferi ĝin.

La flavĉevalo ekflaris avenon, kaj okulrulis de unu al la alia. La servistoj, pensante ke jam estas trafe, ektiris la ŝnurfinajojn, sed la ĉevalo kaptis la okazon pli frue por ekpranci levante Kruĉegulon, kaj piedsvingi du-trifoje sinsekve. Kiam ili ree alproksimiĝis, ĝi plioftigis la piedsvingadon kaj ekkuris ĉirkaŭ Kruĉegulon kiu firme tenis la kolbridon.

-Tenu firme! Tenu! oni kriis al li.

Frat'-Brne alproksimiĝis, pro kio la flavĉevalo piedsvingis al li, kaj se Kruĉegulo ne estis altirinta per ĉiuj fortoj al si mem, la ĉevalo disrompus la ventron de sia mastro. Poste ĝi furioziĝis tiel ke la monakoj kaj servistoj retiriĝis.

-Tenu, Grgo, tenu!

Kruĉegulo tiradis kiompove, tiel ke la kolbrido kalumis liajn manplatojn, kaj fine li ekkuris iom apud ĝi.

La ĉevalo svingiĝis kaj ekkuregis.

Tiam ili vidis mirindaĵon.

Ili vidis ke la viro estis kuranta paralele kun la ĉevalo.

-Lasu ĝin! Lasu! alkriadis ĉiuj.

Kruĉegulo ne lasis ĝin, sed mallongigis la kolbridon, kaj eĉ unu futon ne malantaŭis, tiel ke oni ne povis scii kiu estis pli rapida.

Ĉu oni povas ĉi tion kredi al la okuloj?! diris Koleremulo, kruccsignante. Ĉu tiu ĉi estas la konfuza Kruĉegulo? Ĉu li estas viro, aŭ hundo?

-Rapidaj estas Bukovica-anoj, fi al iliaj patroj! diris Boban, sed tio ĉi estas supermezura!

La ĉevalo kaj Kruĉegulo forflugis antaŭ domoj, kaj deturnis sin laŭlongen de la rivero. La monakoj, lernantoj kaj servistoj bariĝis inter la forĝejo kaj kaj la porjunula kuirejo, kaj ekstaris kontraŭriveren.

Nun oni vidis la alian mirindaĵon.

Kiam la ĉevalo atingis iun salikon, ĝi terurige kaj saltis iom flanken, dum tiumomente Kruĉegulo enplektis la fingrojn en ĝian kolhararon, kaj post tio saltis sur ĝin, kurbiĝis kaj tutgalopigis ĝin sur la insulrando, tiel ke oni vidperdis lin.

-He, tio estas rakontinda! diris denove Koleremulo, frapante permane sian kokson. Se tia ĉi rajdanto povus esti iu ajn, kaj ne la konfuza Koleremulo! He, tio estas rakontinda!

Ĉiuj miris. Iom poste Kruĉegulo revenis. De sur la ĉevalo gutadis ŝvito, kaj la rajdanto perdis nek tiun bulbo-girlandon ĉirkaŭkole, nek la fajrohokon enzone!

-Ho kavaliro! kriis al li la kamaradoj.

-Ĉu mi? Ĉu ne? Mi diru...

-Diablo vin forigu, bestaĉo! ekparolis Trogulo kiu apenaŭ rekonsciiĝis pro miro. Vi deformis mian ĉevalon, bestaĉo!... Enirigu ĝin, Strabulo, kaj striglu ĝin bone!...

-Ĉu mi? Ĉu ne? Mi diru...

-Ĉu vi ja ne estas tiu el Zelengrad, kiu povas salti el unu barelego en la alian? demandis lin Koleremulo.

-Ja kiel? diris la monakejestro.

-Nu, rakontis al mi frat'-Martin Karinjanin ke en Zelengrad ekzistis viro povanta kurvenki la plej rapidan ĉevalon, kaj sensvinge salti el unu barelego en la alian!... Diable, li diris al mi ankaŭ lian nomon, sed mi forgesis... Mi nur scias ke li estis konfuza.

-Ĉu vi estas tiu, Grgo, kara?... Diru ĉu vi estas! oni demandis.

-Ĉu mi? ĉu ne? Mi diru...

Kial vi demandu lin? enmiksiĝis Trtak. Li neniam respondos al vi pri tio kion vi demandas, sed li eĉ pli konfuziĝos... Lasu vi min!... Aŭskultu, Grgo!... Se vi kapablas salti el unu barelego, ekzemple, almenaŭ sur la grundon, kaj ne en alian barelegon, la ekleziuloj donos floreneron?... Ĉu vi volas?...

Grgo gratetis sin.



ХАЗАРСКА ДРЖАВА¹

Устројство хазарске државе веома је сложено, а њени поданици деле се на оне рођене испод ветра (то су Хазари) и остале, који су рођени изнад ветра, то јест долазе у земљу с разних страна, као Грци, Јевреји, Сарацени или Руси. У царству су најбројнији Хазари, сви остали су у сасвим малим групама. Административна подела царства, међутим, иде за тим да ово не пада у очи. Држава је подељена на округе, али су ови тамо где има хебрејског, грчког или арапског живља названи по овима, док је највећи део хазарске државе, на којем живе само Хазари, издељен на неколико округа, под различитим именима.

То је начињено тако да само један од тих чисто хазарских округа носи назив хазарског округа, а остали су име и место у држави добили на друге начине. На северу је, на пример, измишљен цео један нов народ који се одрекао хазарског имена, па свој хазарски језик и свој округ другачије назива. С обзиром на све околности и неповољан положај Хазара у царству, многи Хазари се доиста одричу свог порекла и језика, своје вере и обичаја и крију ко су, представљају се као Грци или Арапи и сматрају да ће тако боље проћи. На западу хазарске државе је нешто Грка и Јевреја који су дошли из ромејског (византијског) царства. Међу њима, Јевреја има у једном округу (после њиховог прогона из грчке царевине) више но осталих, али је такав случај само у том округу. Слично је с хришћанима и у једном другом округу где Хазаре зову нехришћанским живљем. Међутим, однос између свих Хазара у држави и грчких и јеврејских досељеника је такав да је ових других једна петина од оних првих, али се та чињеница губи, јер се односи снага и пописи живља не изводе на основу укупног стања него само по окрузима.

Представници ових округа на двору нису заступљени у сразмери са бројем душа које заступају него према броју округа, што значи да је на двору увек највише оних који нису Хазари, а у држави

¹ Милорад Павић, *Хазарски речник*. Београд, Просвета, 1985; 141-145.

је обрнуто. Напредовање у служби у таквим приликама и при таквом односу снага условљено је слепим поковањем нехазарским представницима. Већ само избегавање имена Хазар овде значи препоруку и омогућава да се на двору начини први корак. Остали кораци су условљени жестоким претходним нападима на Хазаре и подређивањем њихове користи користима Грка, Јевреја, Туркмена, Арапа или Гота, како овде називају Словене. Зашто је то тако тешко је рећи. Један арапски хроничар из IX века бележи: "Неки мој вршњак Хазар рекао ми је недавно необичну реченицу: До нас Хазара допире само један део будућности, онај најтврђи и најнепробојнији, најтежи за савлађивање, тако да се кроз њу пробијамо постранце као кроз јак ветар, или као разливена бара неосетно се шире и плаве нам ноге остаци и отпаци будућности већ убуђали и изанђали. Тако до нас допире или онај најнемилосрднији део будућности или од употребе већ излизана и изгажена будућност, и ми не знамо коме у општој расподели и грабежи будућности долази онај њен лепши и несажвакани део..."

Овакве речи могу се разумети ако се има у виду да каган² не пушта млађу генерацију на власт пре но што напуни 55 година живота, али то важи само за Хазаре. Остали напредују брже, јер каган, који је и сам Хазар, сматра да му они други не могу бити опасни зато што их је мало. Чиновни у хазарској администрацији према најновијим одредбама двора смањују се, а не расту, чим их напусти онај ко их је раније држао, дакле неки каганов вршњак или странац. Тако када кроз коју годину ново покољење Хазара од 55 година стигне на ред за државна звања, ова ће звања већ сва бити или подељена другима, или ће толико изгубити значај да их неће бити вредно ни узимати.

Постоји тако место у Итилу, хазарској престоници, где двојица (можда и сасвим непознатих људи) кад се мимоиђу надаље преузимају узајамно сваки име и судбину оног другог, и настављају живот у замењеним улогама, као да су променили капе. Међу онима који чекају на том месту у реду да замене своју судбину с неким другим, било ким, највише је увек Хазара.

У ратној престоници која је у средишту хазарским живљем најгушеће насељеног дела земље, награде и одликовања се деле

² **Каган** – назив хазарског владара, долази од татарске речи *кан*, што значи *кнез*, хебрејски *коен*.

на подједнаке делове међу све становнике: увек се пази да подједнак број одличја припадне и Грцима и Готима и Арапима и Јеврејима, који живе у хазарском царству. Слично је и с Русима и другима, па и са самим Хазарима који одликовања и новчане износе који их прате деле с осталима на равне части, иако су многобројнији. Али у средиштима јужних провинција, где има Грка, или западних, где су се населили Јевреји, или оних на истоку, где има Персијанаца, Сарацена и других, одликовања се додељују само представницима тих народа, а Хазарима не, јер се ове провинције или окрузи сматрају нехазарским, мада у њима њих има колико и осталих. Тако Хазари у свом делу државе деле погачу са свима, а у осталим деловима нико им не даје ни мрве.

Хазари, иначе, носе највећи терет војних обавеза као најбројнији, али су заповедници из осталих народа подједнако. Војницима се говори да су на свету само зарађени у равнотежи и складу, све остало није вредно пажње. Тако су Хазари задужени за одржавање државе и целине, они су дужни да штите царство и да се за њега боре, природно, остали – Јевреји, Арапи, Грци, Готи и Персијанци настањени у Хазарији вуку свака на своју страну, ка својим матицама.

У време ратних опасности, из појмљивих разлога опасни односи у царству се мењају. Тада се Хазарима дају веће слободе, гледа им се кроз прсте, обнављају се сећања на њихове славне победе у прошлости, јер они су добри војници, копље и сабљу могу хитнути и ногом, секу с две руке одједном и никада нису ни дешњаци ни леваци, него су им обе руке од детињства подједнако увежбане за рат. Сви остали, чим дође до рата, прикључују се својим матичним земљама, Грци пале заједно с ромејским групама и траже енозис, спајање с хришћанском матицом, Арапи прелазе на страну нашег калифе и његове флоте, Персијанци траже несунећене. После сваког рата, пак, све се ово брзо заборавља, чиновници које су страни народи добили под влашћу непријатеља признају им се у хазарској војсци, а Хазари опет склизну до бојеног хлеба.

Бојени хлеб је знак хазарског положаја у хазарској држави. Хазари га производе, јер су житородни делови државе настањени чистим хазарским становништвом. Гладни крајеви уз планински

масив Кавказа једу бојени хлеб, који се продаје будзашто. Небојени хлеб, који такође производе Хазари, плаћа се златом. Хазари, међутим, смеју да купују само тај скупи, небојени хлеб. Уколико неко од Хазара начини прекршај и купи јефтине, бојени хлеб, што је њима строго забрањено, то се чак и по измету може утврдити. Постоје посебне царинске службе које повремено проверавају хазарске нужнике и кажњавају преступнике.

(*Хазарска полемика*)...у току полемике, од које је зависило којој ће се вероисповести приклонити Хазари, владало је велико узнемирење у земљи. За време разговора вођених у раскошном двору хазарског кагана, хазарска земља почела је да хода. Сва је била у покрету. Нико никога није могао двапут наћи на истом месту. Један сведок видео је гомилу људи како носе камење и питају: где да га спустимо? То је било гранично камење хазарског царства, међаши њихових граница. Јер, принцеза Атех је наредила да се камени-међаши носе и да буду у ваздуху, а не на земљи, докле год се не одлучи шта ће се догодити с хазарском вером.



LA ŜTATO DE HAZAROJ

La organizo de hazara ŝtato estas tre komplika kaj ĝiajn ŝtatanon oni dividas je tiuj naskitaj sub la vento (tio estas Hazaroj) kaj aliaj, kiuj naskiĝis super la vento, nome ili alvenas la landon el diversaj direktoj, kiel grekoj, hebreoj, saracenoj aŭ rusoj. En imperio la plej nombraj estas hazaroj, ĉiuj aliaj estas en tute malgrandaj grupoj. Tamen, administra divido de la imperio intencas ke oni tion ne rimarku. La ŝtato estas dividita je distriktoj, kiuj, tie kie vivas loĝantaroj hebrea, greka kaj araba portas iliajn nomojn, dum la plej granda parto de hazara ŝtato kie vivas nur hazaroj estis dividita je kelkaj distriktoj diverse nomitaj.

Oni tion faris tiamaniere, ke nur unu el tiuj vere puraj hazaraj distriktoj portas hazaran nomon; aliaj la nomon kaj la lokon en la ŝtato ricevadis alimaniere. En nordo, ekzemple, elpensita estas unu nova popolo kiu rezignis hazaran nomon kaj sian hazaran lingvon, ankaŭ la distrikto alie nomiĝas. Konsidere ĉiujn tiujn cirkonstancojn kaj malfavoran pozicionde hazaroj, multaj hazaroj en la imperio fakte rezignis pri sia deveno kaj lingvo, religio kaj kutimoj, kaŝante kiu ili vere estas; ili sin prezentadis kiel grekoj aŭ araboj, pensante ke tiamaniere ili pli bone vivos. En la okcidento de hazara ŝtato loĝas iom da grekoj kaj araboj, kiuj venis el romea (bizanca) imperio. Inter ili hebreoj ekzistas en unu distrikto (post ilia persekuto el la greka imperio) iom pli ol aliaj, sed tiel estis nur en tiu distrikto. Simile okazas kun la kristanoj en unu alia distrikto, kie hazarojn oni konsideras nekristana loĝantaro. Dume, rilato inter ĉiuj hazaroj en la ŝtato kaj la grekaj kaj henbreaj almigrintoj estas tia, ke la duemenciitaj faras unu kvinonon de la unuemenciitaj, sed tiu ĉi fakto perdiĝas ĉar rilatoj kaj listoj de loĝantaro ne realiĝas subaze de la tuta ŝtato sed nur laŭ distriktoj.

Reprezentantoj de tiuj ĉi distriktoj ĉe la kortego proporcie ne prezentas sin laŭ la nombro de homoj sed laŭ la nombro de distriktoj; tio signifas ke en la kortego ĉiam estas pli da tiuj, kiuj ne estas hazaroj, sed en la ŝtato estas kontraŭe. La progresado en ofico kun tiaj cirkonstancoj kaj ĉe tia rilato de potencoj estas kondiĉita per blinda submetiĝo al ne hazardaj reprezentantoj. Jam nura evitado de la nomo hazaro ĉi tie signifas la rekomendon kaj ebligas la unuan paŝon eĉ en la kortego. Aliaj

paŝoj estas kondiĉitaj per fortegaj antaŭaj atakoj al hazaroj kaj per subigado de ilia utilo al utiloj de grekoj, hebreatoj, turkmenoj, araboj aŭ gotoj, kiel ĉi tie oni nomas slavojn. Kial estas tiel, tion estas malfacile diri. Unu araba kronikisto el la IX jarcento notis: “Iu mia samaĝulo hazaro diris al mi antaŭ nelonge unu strangan frazon: Ĝis ni hazaroj atingas nur unu parto de la estonteco, la plej malmola kaj plej nepenetrebla parto kiu estas la plej malfacila por superado, tiel ke ni trapenetras ĝin flanke kiel tra la forta vento, aŭ kiel disvastiĝinta marĉo sensente disvastiĝas kaj superakvigas niajn piedojn, restaĵojn kaj defalaĵojn de la estonteco jam ŝimiĝintaj kaj foruzitaj. Tiel ni atingas aŭ la plej senkompatan parton de la estonteco aŭ de la uzado jam elfrotita kaj premtretita estonteco, kaj ni ne scias al kiu en ĝenerala disdivido kaj rabado de la estonteco apartenas ĝia plej bela kaj nefinmaĉita parto...”

Tiajn ĉi vortojn oni povas kompreni se oni konsideras, ke la kagano³ ne lasas la pli junan generacion transpreni regadon antaŭ la 55-a jaro de la vivo, sed tio rilatas nur hazarojn. Aliaj progresas pli rapide ĉar la kagano kiu mem estas hazaro, opinias ke la aliaj ne povas al li esti minacaj ĉar ili estas malmultaj. Rangoj en hazara administracio laŭ la plej nova regularo de la kortego malgrandiĝas, ne kreskas, tuj post la rezigno de l'antaŭulo, nome iu samaĝulo de kagan aŭ eksterlandano. Tiel, dum kelkaj jaroj, kiam nova generacio de 55-jaraj hazaroj estos preta por la ŝtataj oficoj, tiuj ĉi funkcioj jam estos aŭ disdividitaj al aliaj aŭ tiom perdos la signifon, ke ilin transpreni ne havas valoron.

Ekzistas tia loko en ltilo, hazara ĉefurbo, kie duopo (eble tute nekonataj homoj), kiam preterpasas unu la alian, ĉiu reciproke transprenante la nomon kaj faton de tiu alia, kaj daŭrigas la vivon en interŝanĝitaj roloj, same kiel ili ŝanĝus la ĉapon. Inter tuj, kiuj atendas ĉe la sama loko en ordo interŝanĝi sian faton kun iu alia, sendepende kiu, la plej multaj ĉiam estas hazaroj.

En milita ĉefurbo kiu estas en centro kun plej multe da hazara loĝantaro, premiojn kaj ordenojn oni dividas egale al ĉiu loĝanto; ĉiam oni zorgas ke la sama numero de ordenoj apartenu kaj al grekoj, kaj al gotoj, araboj kaj hebreatoj, kiuj vivas en hazara imperio. Simila estas la situacio kun rusoj kaj aliaj, eĉ hazaroj mem, kiuj siajn ordenojn kaj monajn premiojn dividas kun aliaj egale inter si, kvankam ili estas plej multaj. Sed en la centroj de sudaj provincoj, kie vivas grekoj, aŭ nordaj,

³ **Kagano** – nomo de hazara reganto, devenas de tatara vorto *kan*, kiu signifas *duko*, hebree *koen*.

kie loĝiĝis hebreoj, aŭ en oriento, kie estas persoj, saracenoj kaj aliaj, ordenojn oni dividas nur al reprezentantoj de tiuj popoloj, kaj al hazaroj ne, ĉar oni opinias ke tiuj ĉi provincoj kaj distriktoj estas nehazaraj, kvankam tie estas tiom da hazaroj kiom da aliaj. Tiel hazaroj en sia parto de la lando dividas la flanon kun ĉiuj, sed en aliaj partoj neniu al ili donas paneron.

Hazaroj, cetere, portas la plej grandan ŝarĝon de militaj devoj kiel la plej nombraj, sed nombro de estroj el aliaj popoloj estas egala al ilia. Al soldatoj oni diras ke en la mondo militantaj flankoj estas en ekvilibro, ĉio alia ne meritas atenton. Tiel hazaroj devas zorgi por la tuto de la ŝtato; ili nepre devas batali por sia imperio, dum aliaj – hebreoj, araboj, grekoj, gotoj kaj persoj loĝantaj en Hazario, ĉiu tiras je sia flanko, al siaj metropoloj.

Dum la militaj danĝeroj, kompreneble, priskribitaj rilatoj en imperio ŝanĝiĝas. Tiam al hazaroj oni donas pli grandajn liberojn, renovigas la memorojn pri iliaj famaj venkoj en la pasinteco, ĉar ili estas bonaj soldatoj, lancon kaj sabron ili povas ĵeti perpiede, ili tranĉas per du manoj samtempe kaj neniam estas dekstramanuloj aŭ maldekstramanaj, sed ambaŭ iliaj brakoj de infaneco egale estas ekzercitaj por milito. Ĉiuj aliaj, tuj post la komenco de milito, aliĝas al siaj metropolaj landoj – grekoj foriras kun romeaj grupoj kaj serĉas *enozis*, unuiĝon kun kristana metropolo, araboj transiras al kalifo kaj lia floto, Persoj serĉas „necirkumcizitajn“ . Post ĉiu milito, oni ĉion forgesas, rangoj kiujn atingis aliaj popoloj sub aŭtoritato de malamiko oni rekonas en la hazara armeo, sed la hazaroj glitas denove al kolorigita pano.

Kolorigita pano estas signo de hazara pozicio en hazara ŝtato. Hazaroj ĝin produktas, ĉar grenriĉaj partoj de la ŝtato estas loĝigitaj per pura hazara loĝantaro. Malsataj provincoj en la montara masivo ĉe Kaŭkazo manĝas kolorigitan panon, kiun oni vendas malmultekoste. Nekolorigitan panon, kiun ankaŭ produktas hazaroj, oni pagas per oro. Al hazaroj, tamen, estas permesate aĉeti nur tiun ĉi multekostan, nekolorigitan panon. Se iu el hazaroj farus malobeon kaj aĉetus malmultekostan, kolorigitan panon, kio al li ne estas permesita, tion oni povas laŭ la ekskremento konstati. Ekzistas apartaj doganaj postenoj kiuj de tempo al tempo kontrolas hazarajn necesejojn, kaj punas malobeantojn.

(Hazara polemiko)... dum la polemiko, de kiu dependas al kiu religio inklinos Hazaroj, regis granda malkvieto en la lando. Dum la interparoloj gvidataj en luksa kortego de hazara kagano, la lando hazara komencis marŝi. La tuta lando estis en moviĝo. Neniu iun alian povis trovi dufoje je la sama loko. Unu atestanto vidis amason da homoj kiuj portas ŝtonojn kaj demandas, kie oni povas ilin lasi? Tio estis limaj ŝtonoj de hazara imperio, limŝtonoj de ilia limo. Ĉar la princino Ateh ordonis ke limŝtonojn oni devas porti kaj, ke ili estu en aero, ne sur la tero, ĝis kiam oni ne decidos kio okazos kun la hazara religio.


Tradukis
Dro Miodrag Stojanović



Jubileo

Mihajlo I. Pupin

Okaze de la 150 jaroj de lia naskiĝo



Pupin naskiĝis la 4-an de oktobro 1858 en Idvor, vilaĝo en Banat. Lia patro, Konstantin, mortis kiam Mihajlo estis nur 15-jara knabo. Lia patrino nomiĝis Olimpijada (Pijada) kaj estis de aromuna deveno, ĉar ŝia patrino Pupi estis Aromunino el Vevĉani, Makedonio.

La malsuperan gimnazion Mihajlo finlernis en Panĉevo kaj 1872 daŭrigis sian lernadon en Prago. En sia 16-a jaro li foriris al Usono, kie li laboris kiel fizika laboristo, pli poste li frekventis gimnazion kaj en Kolumbia universitato ricevis la bakalaŭran titolon (bachelor of arts). En Kembriĝo li studis matematikon kaj fizikon, en Berlino disvolvidis siajn kapablojn ĉe Helmholtz, kie li ankaŭ doktoriĝis.

Pupin estis prezidanto de Usona unuiĝo de elektroinĝenieroj, honora doktoro de multaj universitatoj, ricevadis altajn sciencajn rekonon kaj distingojn. Li publikigis 24 patentojn el la sfero de komunikado. La teorio de pupinizado, la pupinaj bobenoj estas revolucia solvo de la telefonia problemo. Li atribuis grandan kontribuon al studado de rentgenaj radioj. Pupin estas unu el serbaj sciencistoj kiuj ricevis la plej altajn mondajn rekonon por sia scienca laboro.

Pupin verkis en la serba lingvo la aŭtobiografion *De paŝtejo ĝis scienculo* (*Sa paŝnjaka do nauĉenjaka*, Beogrado 1929 kaj 1979) kaj en la angla sub titolo *De enmigrinto ĝis inventisto* (*From Immigrant to Inventor*, New York 1927). Angla versio estis premiita per Pulicera premio. En la malnova lernejo en Idvor troviĝas la konstanta ekspozicio “Vivo kaj agado de Mihajlo Pupin”

En Beogrado ekzistas Instituto pri informaciaj kaj komunikadaj teknologioj “Mihajlo Pupin”. En Zrenjanin ekzistas teknika fakultato “Mihajlo Pupin”. La granda bulvardo en Nova Beogrado portas lian nomon. Lernejoj en Beogrado, Bijeljina, Bujanovac, Inĝija, Kovaĉica, Kula, Novi Sad kaj Veternik nomiĝas “Mihajlo Pupin”. En Serbia Aakademio de Sciencoj kaj Artoj troviĝas Fondaĵo de Mihajlo Pupin, kie estas presitaj liaj fundamentaj verkoj.

Lia biografio estas prezentita en la monda reto ĉe kelkaj retadreso: http://www.ieee.org/web/aboutus/history_center/biography/pupin.html , http://en.wikipedia.org/wiki/Michael_I._Pupin , http://www.geocities.com/neveyaakov/electro_science/pupin.html , k.t.p.

D-ro Bratislav Marinković



Recenzoj

ANSTATAŬ RECENZO

Komence de decembro aperis serba traduko de libro de A. Korĵenkov "Historio de Esperanto". La libron tradukis membroj de beograda E-societo "Radomir Klajić" kaj mone subtenis ĝian aperon. Mi ne skribis recenzon pri tiu libro, sed mi tradukis el ĝi la antaŭparolon por serba eldono (la antaŭparolon skribis s-ano Dimitrije Janičić).

Antaŭparolo por serba eldono

Historio de Esperanto-movado ĝis nun ne aperis serblingve. Esperanto, lingvo, kiun fine de la 19-a jarcento kreis Lazaro Ludoviko Zamenhof, pola kuracisto, havis, ankoraŭ nun havas kaj, espereble, havos multajn adeptojn en Serbio. Eĉ en la adresaro de la inciatinto de Esperanto troviĝas kelkaj adresoj de homoj el Serbio.

Aperigo de la libro de Aleksandro Korĵenkov, fama rusa esperantisto kaj redaktoro de gazeto "La ondo de Esperanto" instigis grupon de esperantistoj, membroj de E-societo "Radomir Klajić" el Beogrado, kadre de siaj regulaj aktivecoj organizi tradukadon de tiu interesa kaj dokumentita libro. Ni ricevis afablan permeson de la aŭtoro traduki la libron en la serban lingvon. La laboron transprenis deko da membroj de la societo. Diversaj niveloj de kono de la objekto kaj la lingvo, kompreneble, kaŭzis diferencojn en la kvalito de la traduko, egalformeco de la terminologio kaj de la libro, kiu estas verko de unu aŭtoro, pro kio la ĉefredaktoro kaj inciatinto, d-ro Pribislav Marinković faris la unuan lektoradon de la libro kaj poste la kompletan materialon lektoris kaj egaligis Adem Jakupović. Danke al lia peno, la libro, kvankam tradukita de multaj tradukantoj, efikas kiel unueca verko, kion ni deziris.

Ni pripensis la eblecon plilarĝigi la libron per mallonga historio de Esperanto-movado en Serbio. Tamen, ni opiniis, ke la intenco de la libro

kaj havebla spaco ne permesus eĉ parte plenumi nian deziron prezenti historian disvolviĝon de la Esperanto-movado en Serbio. Tio povas, kaj devas, esti temo de aparta libro, kiun, similmaniere, povus realigi esperantistoj, precipe membroj de la serba Instituto de Esperanto. Tio, samtiel, estus bona okazo por pli larĝa esploro kaj celita engaĝo de multnombraj serbaj esperantistoj.

Per aperigo de ĉi tiu libro Esperanto-movado en Serbio festas du gravajn datrevenojn: en Kargujevac estis en 1908 publikigita la unua lernolibro de Esperanto (la aŭtoro estas Jovan Jovanović, instruisto kaj posta urbestro de Kragujevac) kaj en 1909 en Beogrado estis fondita la unua Esperanto-societo, kies tradiciojn hodiaŭ daŭrigas Esperanto-societo “Radomir Klajić”.

Tradukis: Adem Jakupović



ESPERANTO MOVADO EN SERBIO

Slobodan Kljakić

SERBIO EN FRATRIO DE ESPERANTISTOJ

La ekspozicio en Pedagogia muzeo asertas grandan renomon de niaj esperantistoj en la mondo

En Pedagogia muzeo en Beogrado ĵus finiĝis la dektaga ekspozicio „Esperanto – lingvo de amikeco kaj komprenemo“. Ni trarigardis ĉi tiun aranĝon nur duonhoron antaŭ ekdemetado de la prezentitaj eksponaĵoj, sed eĉ tia mankt tempo estis sufiĉa por ekdemandi nin kial ĉi tiu okazintaĵo estas ignorita en ĉiuj medioj, tiugrade ke preskaŭ neniu dediĉis almenaŭ iom da atento.

Ĉi tiu ekspozicio, rezulto de laborego de du estimataj esperantistoj, far de kolego ĵurnalisto Dimitrije Janičić kaj d-ro Pribislav Marinković, organizita okaze de la centjariĝo de publikado de la unua Esperanto-lernolibro en Serbio en Kragujevac, en la 1908-a jaro. Aŭtoro de tiu lernolibro, verkita nur dudeko da jaroj post verkado de Esperanto, kiel universala lingvo, estis Jovan Jovanović.

Post unu jaro (1909) en Beogrado estis fondita la unua Esperanto societo en Serbio, kaj en riĉa historio de tiu internacia lingvo sur ĉi tiuj spacoj, en ĵus fermita ekspozicio, tio atestis pli ol 1 200 eksponaĵoj.

Vortaroj, lernolibroj, Esperantaj libroj kaj esperantigitaj tradukaĵoj el la serba lingvo, multaj enlandaj kaj fremdaj magazenoj, indaĵoj de la Esperanta movado, ĝiaj eĥoj en landa kaj monda filatelioj, fotografioj kaj originalaj dokumentoj pri la mondaj Esperantaj unuiĝoj, donis al la interesiĝantoj tre bonan eblecon koniĝi ne nur kun historio, sed ankaŭ kun la nuna stato de Esperanto- movado, kies aŭtoro estas Ludoviko Lazaro Zamenhof.

El tiu planizita lingvo ĝermis, ĉe la komenco de ĝia ŝtorma historio, ankaŭ la originala literaturo. Dum tiuj 120 jaroj, formita kiel originala, Esperanta literaturo naskis vicon da konsiderindaj aŭtoroj, inter ili ankaŭ la pintajn literaturajn atingaĵojn de islandano Baldur Ragnarson, pasintjare kandidato por Nobelpremio por literaturo.

La unuan Esperantan romanon verkis en Serbio Stevan Živanović, komence de tridekaj jaroj de la pasinta jarcento, sed verŝajne la plej fekunda verkisto en Esperanto post la dua mondmilito estis nia mondkonata vojaĝanto kaj esploristo Tubor Sekelj.

El multaj aŭtoroj verkantaj Esperanto-literaturon en Serbio, ĉi tie ni mencias Dimitrije Janičić, unu el la organizantoj de la ekspozicio, kiu por siaj poemoj verkitaj en Esperanto, dum pasintaj tri jaroj, ricevis la internaciajn premiojn en Rusio, Hispanio, Litvo, Bulgario, Portugalio kaj Japano. Siaspeca kuriozaĵo estas ke Janičić ne verkas poemojn en la serba lingvo.

Kun aparta fiero niaj esperantistoj akcentas fakton ke en ĉi tiu planizita lingvo, kiun en pli ol cent landoj parolas dudeko milionoj da homoj, estas tradukita „Montara krono“ de Njegoš. Baldaŭ, kiel la plej nova, devus aperi tradukaĵo en Esperanto la romano de Filip David „Rakonto pri amo kaj morto“.

Jam en la unuaj jardekoj de ĉi tiu movado, en Esperanto estas tradukitaj la plej valoraj libroj de la monda literaturo, ekde Biblio ĝis la dramoj de Ŝekspiro, de Iliado ĝis la verkoj de Puŝkin kaj Gete. Multaj fakuloj asertas ke la plej grandan identecon de signifo de la originala teksto kaj tradukaĵo ebligas ĵus Esperanto.

Verŝajne ankaŭ tio estas unu el la rezonoj ke, antaŭ kvar jaroj en Eŭropa parlamento, oni iniciatis ke Esperanto estu unu el la oficialaj lingvoj, t.e. ponto inter multaj oficialaj lingvoj de Eŭropa unio.

Pro tio ĝin rekomendas ankaŭ iaj ekkonoj, pri kiuj estas skribite en Londona „Gardijan“. Nome, iu elkalkulis ke Esperanton oni lernas kvin foje pli facile ol la hispanan aŭ francan, dekfoje pli facile ol la rusan, kaj dudekfoje pli simple ol la araban aŭ ĉinan lingvojn.

Eĉ se tio ne estas entute tiel, longdaŭreco de la planizita lingvo, kia estas Esperanto, kontraŭ kiu batalis Hitler kaj Stalin, al ĝi ne estas loko en totalismaj sistemoj, sendube atestas ke spaco por uzado de Esperanto hodiaŭ disvastiĝas kaj ke la Esperanta fratrigo kolektas, ĉiam pli kaj pli, grandan nombron da adeptoj.

En konsiderinda volumeno al tio kontribuas Interneto, en kiu grandan popularecon ĝuas speciala hejmpaĝo por lernado de Esperanto (www.lernu.net).

La ekspozicio okazinta en Pedagogia muzeo de Serbio konfirmis, krom alie, la grandan renomon kiun esperantistoj el Serbio havas en la mondo. Tio estas rekonita ankaŭ per la fakto ke ili estas tre ĉeestantaj en multaj Esperantaj hejmpaĝoj, ĵus kiel ili estas regulaj, eminentaj kunlaborantoj de la multnombraj magazenoj, aperantaj en la mondo en tiu ĉi lingvo.

Publikigita en ĵurnalo „Politika“, 29. IX 2008
Tradukis: d-ro Pribislav Marinković (traduko publikigita en lia reta gazeto „Primara“)



Informoj

KOMUNA FESTO DE ZAMENHOFA TAGO

Serbiaj esperantistoj komune festas ĉijaran Tagon de Zamenhof. Solenaĵo okazos la 13an de decembro, en la urbo Kragujevac, iama ĉefurbo de Serbio, en halo de la urba teatro. En la urbo Kragujevac, antaŭ unu jarcento aperis la unua lernolibro por Esperanto en la serba lingvo. Ĝia aŭtoro estis Jovan P. Jovanoviĉ, poste ĉefurbestro de la urbo.

Komunan feston iniciatis kaj organizas Saša Pilipoviĉ, konata aktoro kaj esperantisto, en Esperantujo konata laŭ siaj kabaredoj dum universalaj kongresoj, kiuj estis ĉiam alte taksataj en kulturaj dumkongresaj okazaĵoj.

Programo de kuna festo kiu ĉi-semajne estis aprobita de Prezidantaro de Serbia Esperanto-Ligo, estas tre riĉa. Krom prelego pri Zamenhof, planita estas prelego pri historio de Esperanto-movado en Serbio, aparte pri la internacia lingvo en Kragujevac (preleganto estos Boriša Miliĉević, direktoro de E-Instituto). Pri modernaj eblecoj de lernado de Esperanto parolos Radojica Petroviĉ, prezidanto de ILEI. Pri siaj spertoj de instruisto de Esperanto en la mondo parolos Tereza Kapista. Inter prelegoj estas planitaj kulturamuza programo, apero de aktoroj, kantistoj, legado de originalaj esperantaj verkoj, ktp.

Post programo estos fondita nova Esperanto-societo, Kragujevac.

Dum la festo estos prezentitaj du novaj libroj: *Historio de Esperanto* de A. Korĵenkov, kiun serbigis membroj de Beograda Esperanto-societo, kaj romano *Sonĝo pri amo kaj morto* de konata serbia verkisto Filip David, kiun tradukis Agnesa Eremija.

Dimitrije Janičić

CENT JAROJ DE LA UNUA LERNOLIBRO DE ESPERANTO EN SERBIO

La unua lernolibro de internacia lingvo Esperanto en Serbio aperis en urbo Kragujevac antaŭ cent jaroj (1908). Tio estis libro *Esperanto – internacia lingvo - instrukcio por lernado* (Esperanto, meĉnarodni jezik – uputstvo za izučavanje). Aŭtoro estis instruisto Jovan P. Jovanoviĉ, posta urbestro de urbo Kragujevac. Lernolibro enhavas bazan kurson de internacia lingvo laŭ ĉeha lernolibro de T. Ĉejka kaj Krumholc. En titola paĝo de lernolibro estis skribite: "Unu lingvo por ĉiuj popoloj".

Datreveno okaze de centjarigo de la unua esperanta lernolibro por serbio okazos en urbo Kragujevac. Planita estas komuna Tago de Zamenhof por ĉiuj sebiaj esperantistoj. Partoprenos esperantistoj el Beograd, Niš, Zajeĉar, Jagodina, Novi Sad kaj gastoj el Kroatio.



Fotoj: Aŭtoro de la unua Esperanta lernolibro kaj titolpaĝo de la libro

Dimitrije Janiĉiĉ

Dua kongreso de sebiaj esperantistoj

URBO JAGODINA – DOMMASTRO DE KONGRESO

Prezidantaro de Serbia Esperanto Ligo dum decembra kunveno en Niš decidis: dommastro de la Dua kongreso de serbiaj esperantistoj estos urbo Jagodina, kaj ĉeforganizanto de la kongreso estos Esperanto-societo "Sreten Aĝiĉ" el urbo Jagodina. Kongreso okazos de la 26a ĝis la 28a de junio 2009. Jen kelkaj bazaj informoj pri la urbo-dommastro kaj ĝia Esperanto-societo.

Urbo Jagodina situas en Meza Pomoravlje, sur la rivero Belica, en Jagodina kampo for de Beogrado 156 kilometrojn, sur aŭtoŝoseo E-5. Tra la urbo pasas elektra fervojlinio Beograd – Niš. Komunumo havas 82.000 da loĝantoj, kaj en urbo mem vivas 40.000 loĝantoj. La urbo estas grava regiona ekonomia, kultura kaj administra centro, sidejo de komunumo, laŭ multaj aferoj – ekskluziva. La urbo situas en supermara alteco de 116 m. Meza jara temperaturo estas inter 11 kaj 12 gradusoj de Celziuso.

Jagodina komunumo okupas surfacon de 470 kvadratajn kilometrojn, havas 54 loĝigitajn lokojn, limiĝas kun sep komunumoj. La plej alta pinto estas Ĝurĝevo brdo 213 m alta.

En urbo, en kadro de turista komplekso, estas malfermita la unua muzeo de vaksaj figuroj en Serbio (sesa en Eŭropo). La urbo estas konata ankaŭ laŭ Akva parko, unika en Serbio, kun ses basenoj por sporto kaj rekreado situantaj en la surfaco de 30.000 kvadrataj metroj. En proksimeco de la parko estas zoo-parko kun okdek specoj de ekzotikaj bestoj.

Al kulturo de la urbo apartenas la muzeo de naivo – loko de gardado kaj konfirmado de verkoj de tielnomataj naivaj pentristoj, konata ne nur en teritorio de eksa Jugoslavio, sed en la mondo. Jagodina biblioteko (kun sekcioj en 27 vilaĝoj) estis fondita en la jaro 1869. Apud Stara crkva (Malnova preĝejo) kies konstruon komencis princo Miloš Obrenoviĉ 1818, konata estas Nova preĝejo kaj templo de sankta Ĝorĝo.

Inter kulturaj manifestacioj ni mencias Tagojn de komedio kiuj okazas ĉijare de la 20a ĝis la 27a de marto, kio estas konkuro de teatroj de Serbio (komencis en la jaro 1971) por premio "Jovanĉa Miciĉ". En proksimeco estas monaĥejoj Ravanica, Manasija, Kaleniĉ kaj Joŝanica. Kompreneble, oni bezonas viziti domicilan muzeon en kiu oni gardas multe da tre valoraj eksponaĵoj.


En Jagodina laboras kelkaj radiostacioj, du TV stacioj kaj aperas semajna gazeto "Nova vojo" (Novi put). La plej konata TV stacio estas "Palma plus" kiu per sia programo kovras 2/3 da surfaco de Serbio.

Ĉeforganizanto de nia kongreso estas Esperanto societo "Sreten Aĝiĉ", kiu estis fondita antaŭ pli ol duono de jarcento – en la jaro 1952. Ni esperas ke ĉi tiu kongreso helpos ĝin plinombri, kvankam en ĝi laboris tre konataj serbaj esperantistoj kiel estis profesoro Sreten Aĝiĉ kaj pastro Milivoje Pavloviĉ, fondintoj de societo. Hodiaŭ, eminenta estas Ĵivko Ivanoviĉ, aŭtoro de lernolibro kaj kelkaj menciindaj Esperanto-libroj. Li estis prezidanto de Plenum-komitato de societo. Prezidanto de la societo estas Nikola Iliĉ, sekretario Toni Stojanoviĉ kaj anstataŭanto de la prezidanto de Plenum-komitato estas profesorino Senka Tomiĉ kiu

verkas esperantajn poemojn. Kasisto de la societo estas Radiša Milutinoviĉ.

Societo portas nomon de sia fondinto, profesoro Sreten Aĝiĉ, kiu estis la unua direktoro kaj fondinto de Instruista lernejo en Jagodina, tre konata pedagogo, esperantisto kaj kultura aktivulo de tiu regiono.

Dimitrije Janičić



Muzeo de naiva pentroarto en Jagodina



Monaĥejo Manasija proksime de Jagodina

En Subotica

OMAĜE AL TIBOR SEKELJ

En urbo Subotica (Serbio) kie longan tempon vivis, laboris kaj agis eminenta Esperantisto kaj mondvojaĝanto Tibor Sekelj, la 20-an de septembro de 2008 renkontiĝis Esperantistoj el Subotica, Senta kaj Novi Sad, por omaĝi lian forpason antaŭ dudek jaroj. Dum tiu ĉi renkontiĝo ili rememoris lian vivovoĵon plene dediĉita al Esperanto. Poste ni kune vizitis lian tombon kaj metis floroj sur ĝin. Vidvino de Tibor Erĵebet Sekelj per kortuŝaj vortoj emfazis siajn sentojn al forpasinto. Ŝi diris;

"Kara Tibor!

Estas nun strange stari ĉi tie kaj laŭte paroli. Mi al kutimiĝis, ke ĉie mi povas rakonti al vi, sed tion mi faras en miaj pensoj.

Neniam mi forgesas viajn lastajn frazojn en la hospitalo antaŭ 20 jaroj: "Mi estas laca. Mi ŝatus dormi. Iru hejmen kaj venu morgaŭ." Sed la sekvontan tagon vi jam ne atendis min. Ni simple ne povis kredi, ke vi fizike ne plu estas inter ni. Tiam ni esperis, ke vi foje revenos, ke vi nur iris ien por "viziti vian farmon". Pasis jam 20 jaroj kaj ni scias, ke via tiama forvojaĝo ne estis via kutima "inspekcia vojaĝo tra la mondo".

Ĉiuj, kiuj nun estas ĉi tie, bone konis vin, se ne persone, tiam pere de viaj verkoj. Preskaŭ ĉiuj el ni povus rakonti sian agrablan renkontiĝon, aŭ travivaĵon kun vi. Ĉiam estis plezuro paroli kun vi, sed pri vi nun estas malfacila. Ne pro tio, ĉar ne estas kion diri, kontraŭe tiom vi faris, ke ni havas la senton, ke vivis la vivon de almenaŭ tri homoj. Anstataŭ ol mi nun parolus pri via vivovojo (kion la plejmulto bone konas), mi deziras akcenti du plej simpatiaj viaj karakteroj.

Bonege vi mastrumis kun la tempo, kaj vi havis tempon por ĉio. Vi havis tempon por studi, por legi kaj lerni, por verki, por instrui, por prelegi, por pensi, desegni, redakti gazetojn, por fondi kaj gvidi Esperanto societojn, multon labori por disvastigo de nia lingvo. Kaj vi havis tempon por vojaĝi, por telefoni, korespondi, viziti kaj akcepti amikojn, por aŭskulti la homojn, sed vi ankaŭ ŝatis aĉetumi, kuiri, ordigi, amuzi. Vi diris, ke vi estas feliĉa homo, ĉar ĉiam dum via vivo vi faris tion, kion vi ŝatis. Por vi la tuta vivo estis granda amuzo kaj tio radiis el via tuta personeco.

La alia estis, ke vi vere ŝatis kaj amis preskaŭ ĉiun homon, aŭ eĉ pli, la tutan naturon. Kompreneble estis pli proksimaj personoj en via koro, amikoj viaj, sed por vi ne gravis ĉu li aŭ ŝi estas reĝo, prezidanto, direktoro, iu grava persono, aŭ simpla ĉiutaga homo. Ne gravis la koloro de sia haŭto, nek la lingvo kion li aŭ ŝi parolis, nek la religio, nek la aĝon. Same vi kapablis paroli kun la infanoj kaj kun maljunuloj. Kun la sama estimo vi proksimiĝis al ĉiuj. Kompreneble ankaŭ vi havis malamikojn, sed multegajn amikojn.

Ni estas nur kelkaj el tiuj ĉi tie. Ni venis hodiaŭ por rememori pri vi, kaj danki al vi per unu vorto ĉion. En miaj pensoj mi jam multfoje faris, sed laŭte neniam mi eldiris: "Ni dankas al viaj gepatroj, ke ili edukis tian filon."

Nun ni iros hejmen, sed vi ne restos ĉi tie, ĉar ĉiam kaj ĉie kiam ni pensas pri vi, aŭ parolas pri vi, vi estos kaj restos inter ni.

Informis Katarina Kujundžić



En urbo Jagodina 2009

KONGRESO DE SERBAJ ESPERANTISTOJ

La dua kongreso de serbiaj esperantistoj, laŭ decido de la prezidantaro de Serbia Esperanto-Ligo (sabaton, la 6-an de decembro en Niš) okazos de la 26-a ĝis la 28-a junio 2009 en la urbo Jagodina. Organizanto de la dua kongreso estas Esperanto societo "Sreten Aĝić", kiu estis fondita en la jaro 1952. en tiu urbo.

Urbo Jagodina, situanta en Meza Pomoravlje, 156 kilometrojn for de Beogrado, sur la aŭtoŝoseo E-5, estas grava regiona centro kaj sidejo de la komunumo. La komunumo Jagodina havas 82.000 loĝantojn kaj la urbo mem havas 40.000 loĝantojn.

Dimitrije Janičić

Esperanto en Beogrado

NOVA KURSO POR KOMENCANTOJ

Intereso por Esperanto en Beogrado estas pli bona post la septembra ekspozicio en Pedagogia muzeo "Esperanto – lingvo de kompreno kaj amikeco". Pro tio beograda Esperanto-societo "Radomir Klajić" fine de novembro organizis kurson por komencantoj. Por la kurso aliĝis deko da interesuloj.

Kurson gvidas Adem Jakupović, unu el aŭtoroj de la vortaro, kaj kurso daŭros du monatojn.

Lastjare en Beogrado aperis vortaro de Esperanto kaj lernolibro de Stano Marček en serba lingvo. Tio signifas, ke ekzistas literaturo por lernado.

Dimitrije Janičić

Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

Заповедни начин се гради додавањем наставка -ц за сва лица једине и множине.

alporti	-донети	alportu	-донеси или донесите
kanti	-певати	kantu	-певај или певајте
ili alportu	-нека (они) донесу	ŝi kantu	-нека (она) пева

После сложене свезе por ke (да би) увек иде заповедни начин.

Por ke mi ellernu la lecionon, vi devas alporti al mi la lernolibron.

-Да бих научио (изучио) лекцију, треба да ми донесеш (или донесете) уџбеник.

Por ke la geturistoj povu viziti la fortikaĵon, la vetero devas esti bela.

-Да би туристи и туристкиње могли да посете тврђаву, време треба да буде лепо.

Исто тако, после глагола или израза који исказује жељу, молбу, захтев, наредбу или потребу обавезно иде ke са заповедним начином.

Mi deziras, ke ili tuj venu -(Ја) желим да они одмах дођу.

Ŝi petas, ke ni sendu al ŝi unu lego-libron de Esperanto -Она моли да јој пошаљемо једну есперантску читанку.

Estas necese, ke vi ekzercu. -Потребно је да вежбаш (или вежбате)

Кад је подмет исти код оба глагола, онда се уместо свезе ke и заповедног начина употребљава неодређени начин.

Ili deziras manĝi nun -Они желе јести (или да једу) сада.

Ni volis saluti viajn gastojn. -Хтели смо поздравити (или да поздравимо) твоје (или ваше) госте.

Од глагола *voli* и прилога *bone* саставићемо реч која нам је често потребна.

<i>bone</i>	-добро	<i>voli</i>	-хтети
Одбацујено –е и корен <i>bon-</i> везујемо са <i>voli</i> :			
<i>bonvoli</i>	-изволети	<i>bonvolu!</i>	-изволи, изволите!

Bonvolu eliri kaj vidi, ĉu la vetero estas bela.

Изволи(те) изаћи и видети да ли је време лепо.

Bonvolu resti, se vi havas tempon.

Изволи(те) остати ако имаш (или имате) времена.

Запамтите:

<i>tempo</i>	-време (календарско)
<i>vetero</i>	-време (атмосферско)

∴

Ако не знамо или не желимо да кажемо које лице врши радњу, употребљавамо *безличну заменицу* *oni*.

<u><i>Oni</i></u> <i>laboru!</i>	-Нека се ради!
<u><i>Oni</i></u> <i>diru!</i>	-Нека се каже!
<u><i>oni</i></u> <i>rakontas</i>	-прича се
<u><i>oni</i></u> <i>parolas</i>	-говори се

Разуме се, *безлична заменица* не може стајати у изразима који су само по себи *безлични*.

<i>estas bone</i>	-добро је
<i>temas (pri)</i>	-ради се (о), реч је (о)
<i>ne gravas</i>	-није важно

∴

Научићемо сада и повратну заменицу *ŝi* и од ње изведену присвојну заменицу *ŝia*, које се употребљавају само са трећим лицем једнине и множине и са *безличном заменицом* *oni*.

Ĉiu estas kontenta je (pri) ŝi mem. -Свако је задовољан самим собом.

Ju pli oni babilas, des pli oni al **si** malutilas. -Уколико се више брбља,
утолико се више **себи** шкоди.

Ili lavas **sin** je la 6-a horo
Li razas **sin** ĉiutage.

-Они се умивају у 6 сати.
-Он се брије свакодневно.

Proverboj

Ĉiu havas sian guston.

-(Свако има свој укус)

-Свако по своме

Ĉiu forĝas sian sorton.

-(Свако кује своју судбину)

-Свако је ковач своје среће.

За повратни облик првог и другог лица јединине и множине понавља се лична заменица истог лица.

Mi lavas **min**.

-Ја се умивам. (Ја умивам **мене**.)

Vi razas **vin**.

-Ти се бријеш. (Ти бријеш **тебе**.) или

-Ви се бријете. (Ви бријете **вас**.)

Ni banas **nin**.

-Ми се купамо. (Ми купамо **нас**.)

Исто важи и за присвојне заменице:

Mi amas **miajn** infanojn.

-Ја волим своју децу.

-(Ја волим **моју** децу.)

Vi ŝatas **vian** ĝardenon.

-Ти волиш своју башту.

-(Ти волиш **твоју** башту.) или

-Ви волите своју башту.

-(Ви волите **вашу** башту.)

Ni konas bone **nian** urbon


-Ми познајемо добро свој град.

-(Ми познајемо добро **наш** град.)

∴

(наставиће се)

Amuzo



Biletvendejo

Ĉe la biletvendejo nervoza biletaĉetanto krias:

- Kion signifas „biletoj disvenditaj“? Biletoj disvenditaj – mi ne povas tion kompreni.

La biletvendistino tre milde demandas:

- Mi petas vin, diru al mi kiun vorton vi ne komprenis.

Konfuzigaj signoj apud aŭtoŝoseo

Policisto haltigas aŭtomobilon plenan de monaĥinoj kaj demandas:

“Kial vi veturas nur 22 kilometrojn hore. Ĉi tie estas permesite veturi 130 kilometrojn hore.”

La monaĥino kiu ŝoforas, respondas: “Sed mi vidis trafiksignon kun surskribo 22, ne 130.”

La policano respondas: “Sed tio estas numero de la ŝoseo, ne limigo de rapideco.”

En tiu momento la policano vidas, ke la monaĥinoj sidantaj sur la malantaŭa benko forte tremas kaj aspektas tre timigitaj. Li demandas: “Pardonu al mi, fratino, kio okazas kun viaj kunvojaĝantinoj?”

La ŝoforino respondas: “Oh, ni ĵus forlasis la ŝoseon numero 235.”

Datreveno de abiturienta ekzameno

Kolektiĝis iamaj lernantoj kaj diskutas pri tio, kie oni festu la 10-an datrevenon de ilia abiturienta ekzameno.

– Iru ni al „Diboĉulo“, tie la kelnerinoj estas plej belaj. Kaj ili faris tiel.

Denove, por la 20-a datreveno:

– Kien ni iru?

– Iru ni al „Diboĉulo“, tie oni plej bone manĝas. Kaj ili faris tiel.

Jen la 30-a datreveno:

– Kien ni iru?

– Iru ni al „Diboĉulo“, tie ne estas trablovo kaj neniu malvarmumos. Kaj ili faris tiel.

Pasis ankoraŭ dek jaroj, venis la 40-a datreveno:

– Kien ni iru?

– Iru ni al „Diboĉulo“, tie la prezoj ne estas altaj kaj pensio ne suferos tro. Kaj ili faris tiel.

Por la 50-a datreveno:

– Kien ni iru?

– Iru ni al „Diboĉulo“, tie manĝaĵoj estas molaj kaj vi ne tre bezonas dentojn. Kaj ili faris tiel.

Fine, venis la 60-a datreveno:

– Kien ni iru?

– Iru ni al „Diboĉulo“. Kaj aliaj respondas unuvoĉe:

– Bonege, ni neniam estis tie.



94-a Universala Kongreso de Esperanto
25.07-1.08.2009
Bjalistoko, Pollando



La 61-a kongreso de IFEF,
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazos
en Triesto (Italio)
de la 23-a ĝis la 29-a de majo 2009.



La 42-a konferenco de ILEI
okazos en Krakovo (Pollando)
de la 17-a ĝis la 25-a de julio 2009

Emblemo
ankoraŭ ne
difinita

La 2-a kongreso de serbiaj esperantistoj
okazos en Jagodino (Serbio)
de la 26-a ĝis la 28-a de junio 2009